

AMO 100 – la rezultoj



La seminario okazis kun partopreno de 14 homoj – kvin surlokaj kaj 14 entute. Seminarianoj venis el Francio (1), Hungario (6 – 5 fizike kunvenis), Irano (4), Serbio (1), Svislando (1) kaj Ukraino (1).

Jen resumoj pri la diskutoj kaj rekomendoj por la kvin seminariaj temoj.

① Kulturo kaj Literaturo

Diskutoj

Grava kaj konsultinda verko restas la ĉ. 800-paĝa ‘Enciklopedio de Eo-kulturo’. Indas krei du-lingvajn kulturajn verkojn, tiel, ke ili povu aperi en publikaj bibliotekoj kaj muzeoj. Praktiva ekzemplo estas la dulingva libro pri Hector Hodler, pretigita en Svislando kaj diskonigita tra librejoj en Svislando kaj Francio. Subteninda estas ago-grupoj de movadaj tradukistoj, kiuj starigis kunlaboron kun tradukistoj ne-esperantistaj.

Rekomendoj

- Donu al la pionira serio ‘Okcidento-Oriento’ la kompletigon: la nordo, la sudo, afrikaj kaj latinamerikaj landoj.
- Kreu liston de tradukitaj verkoj tutmonde, kun indeksoj alfabetaj kaj landaj.
- Kreu liston de originalaj verkoj: romanoj ks. kun indekso aranĝebla laŭ aŭtoroj, lokoj kaj titoloj.
- Submetu artikolojn en Eo al ekstermovadaj kulturaj retejoj kiel ekz. INK
- Arigu informojn kaj indeksojn pri kantaroj; la enhavon lingve kaj muzike estu pli rigore kontrolata.

② Organizaj strukturoj

Diskutoj

La malsufiĉa kvanto de junuloj en nia komunumo bezonas atenton. LA de UEA kaj sekcioj de ILEI planu erojn, kiuj allogos junulojn. La komuna okazigo de la Kongresoj de ILEI kaj TEJO en Lignano, Italio, donas eblojn por dialogado kaj planado de TEJO kaj ILEI. Konstatite, ke tradiciaj movadaj strukturoj ne allogas junulojn; aliaj rimedoj uzendas: Fejsbukaj grupoj atingos junulojn; same la uzado de la faciligoj de sociaj medioj.

Rekomendoj

- Gravas kaj urĝas la rejunigo de la movadanoj, ĉefe en Eŭropo kaj Azio.
- Protektindas estas la plurlingvaj versioj de Duolingo, kiuj riskas malaperi.
- Landaj Asocioj dediĉu rimedojn al la kunlaboro kun UN-asocioj kun la celo, ke Esperanto aperu en la listoj de nemateriaj valoraĵoj, kiel jam atingita en Kroatio kaj Pollando. En Afriko, UN havas altan prestiĝon kaj atingoj tie estas imageblaj.
- En Hungario kaj aliaj landoj, ILEI rilatu land-nivele pli forte kun ekstermovadaj edukaj agantoj.

3 Faka agado

Diskutoj

UMEA eniris projekton kun polaj kuracistoj, sed pro tio la uzo de Esperanto ege ŝrumpis. IFEF devas allogi pli junaj fervojistoj. Plie, ĝi devas tutmondigi sin. Ĝi restas preskaŭ tute Eŭropa faka asocio kiam fervojoj ekzistas kaj evoluas tutmende. La ĉinaj fervojistoj ĉefe agas tra IKEF, kaj ne tra IFEF. Niaj komercistoj en IKEF kunsidas rete per Zoom (tutmonde) kaj Voov (por ĉinoj) ĉiudimanĉe. Laŭdinda atingo.

Rekomendoj

- La faka agado akiru pli da financaj rimedoj, ekz. IFEF en projekto 'Verden'.
- Dividu la fakan laboron inter pli da homoj, por ne superŝargu solulajn agantojn.
- Revivigu ISAE, aŭ alimaniere spronu la sciencan agadon.
- Spronu rejunigon de fakaj agantoj, ekzemple en IFEF kaj UMEA.

4 Kongresoj

Diskutoj

Sur la bilanco: grandaj aŭ malgrandaj kongresoj? Pri UK venis komento: "Tie mi tuj sentas min hejme". Aliflanke eta renkontiĝoj estas familiecaj. Okazadu plu en Afriko kongresoj, kiuj altiras homojn el najbaraj landoj. Simile en Eŭropo: Hungaroj iris al la kongreso en apudlima urbo en Kroatio. Renkontiĝoj kuraĝigindaj estas tiuj, kiuj logas varian partoprenantaron, ekzemple la Eŭrop-dimensia kongreso en Strasburgo en 2024.

Rekomendoj

- Kongresoj ĉiam estu hibridaj, por ebligi kiel eble plej vastan partoprenon.
- Daŭrigu la uzon de komunaj kongresoj inter du aŭ tri landoj kun malsamaj naciaj lingvoj, por kreskigi la uzon de Esperanto.
- Organizante nacian kongreson, invitu gastojn el najbaraj landoj.
- Dediĉu rimedojn al kontinentaj kongresoj, ekzemple TAKE en Ameriko.
- La Danubaj kunvenoj bele sukcesas; starigu similan retgrupon por la Rejno.
- Okaze de la UK en Aruŝa en 2024, UEA kaj unuopuloj portu tien librojn por la afrika progreso.

5 Komunikado

Diskutoj

Por la interna informado, UEA eldonu Jarlibron en la jaro post la jaro en kiu estas elektita nova Estraro de UEA. Memoru, ke renoviĝas ankaŭ la Komitato kaj komisionoj de UEA. Pliaj rimedoj por internaj informfluoj estas la Gazetaraj Komunikoj de UEA kaj la EKO-komunikoj de ILEI kaj aliaj. Starigindas informadaj listoj kaj la retejoj en Esperanto kaj pluraj lingvoj. Virinoj en la Afrika mondo okazadas per *WhatsApp*. Zoom vaste uzeblas, nelaste por AMO-seminarioj. Gvidilo estas pretiginda por efikigi la internan komunikadon. Por la alekstera komunikado uzeblas Telegramo, LinkedIn kaj multaj similaj kanaloj.

Rekomendoj

- Restarigu Informan Bankon kun uzindaj materialoj.
- Komuniku al Unesko-komisionoj informoj pri la Tago de Esperanto (julio 26).
- Kontaktu la Unesko-lernejoj kaj Unesko–universitatoj.
- Funkciu informada reto, kiu uzu la plej diversajn platformojn

Konkludo

La seminario finiĝis per dankesprimoj al ĉiu partopreninto kaj al la irananoj pro la realigo de la *Zoom*-ligo, kiu ebligis la tutan seminarian laboron.

//Restas loko por fotoj el la seminario! Mi kreos tri-paĝan sveltigitan PDF por disiri kun EKO 37 en junio 26.

// Intertempe bonvenas reagoj kaj korektado flanke de la nunaj ricevantoj.

Aktivula trejnado>2023>AMO 100 detala raporto.docx kaj PDF